

LA PACDEFENDANTO

N-o. 31-32 NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Jul.-Aug. 1954.

MORTIS KAMARADO

La 12. de junio 1954 en la 8.horo matene subite forlasis niajn vicojn unu el niaj plej aktivaj kamaradoj, Rudolf Z a n á š k a el urbo Kopřivnice en aĝo de 47 jaroj. La sorto volis, ke ĵus en momento kiam li intencis trapasi pordegon de granda automobil-uzino TATRA en urbo Kopřivnice, kie li estis okupita, subite enveturis peza ŝarĝaŭtomobilo kur sablo. Vidinte tion li saltis malantaŭen de la pordego por fari liberan vojon al la aŭtomobilo. De multa pluvo moligita vojo kaŭzis kliniĝon de la peze ŝarĝita veturilo kontraŭ la pordego malantaŭ kiu k-do Zanáška sin kaŝis kaj tiu estis forte premita kontraŭ la muro. La sekvo estis disrompitaj ripoj, kiuj tre verŝajne enpenetris en lian koron aŭ pulmon, ĉar post kelkaj minutoj, kiam oni transportis lin en lokan hospitalon finiĝis lia vivo.

K-do Rudolf Z a n á š k a estis unu el la malmultaj esperantistoj, kiu en senlaca laboro por Esperanto kaj la mondpaco oferis sian tutan liberan tempon kaj ofte eĉ noktojn, kiam tio estis necesa. Neniam li rifuzis plenumi laboron kaj neniam li plendis pro troa okupiteco. Kion aliaj ne povis fari, tion faris li mem. Li estis modelo en la Esperanto-klubo en Kopřivnice kaj la plej bona konsilanto por ĉiu, kiu kun peto al li venis. Zanáška ne nur estis alte ŝatata kaj amata de ĉiuj esperantistoj, sed ankaŭ la neesperantistaj k-doĵ en la uzino, laborejo kaj organizoj lin multe estimis kaj amis.

Kaj kiam la Esperanto-ligo en Praha likvidiĝis, estis Zanáška en Kopřivnice, kiu diris kategorie "NE!" kaj daŭrigis per senlaca persisto la laborojn de sia grupo, kiun li sukcesis aligi al la uzina kultura klubo por povi leĝe daŭrigi. Sub lia honesta gvido la grupo vivas ĝis nun, daŭre kreskas kaj estas modela inter la aliaj grupoj de la regiono Ostrava. Dank' al k-do R. Zanáška fondiĝis la unua Esperanto muzo en Ĉeĥoslovakio en Kopřivnice, kiu daŭre ekzistas kaj kompletiĝas. Krom tio li zorgis pri Migranta pacekspozicio de LA PACDEFENDANTO, kiun li disponis al ĉiu petinto.

Antaŭ monatoj, kiam estis minacita la plua apero de nia cirkulero, li kaj k-dino Hřčková decidis plue zorgi pri ĝia eldonado kaj distribuado. Ambaŭ gek-doĵ pro sia revolucia kaj progresema vidpurinkto kaj scioj, ĝuis la plenan konfidon kaj aprobon de la sindikata klubestraro, kiu donis sian konsenton al ilia poresperanta kaj porpaca agado. Dank' al tio niaj legantoj ankoraŭ ricevas sian cirkuleron.

Nekompareblan doloron eksentis ĉiuj esierantistoj-pacdefendantoj kiam ili kunvenis la 15. de junio ĉirkaŭ la 16.horo kiel funebraj gastoj antaŭ la hejmo de la morta k-do Rudolf Zanáška. Amasaj florkronoj kun verdaj kaj ruĝaj rubandoj ornamis la funebran veturilon tiratan de du ĉevaloj survoje al la loka preĝejo. Kiam la uzina kapelo ekludis funebran marŝon, ekmoviĝis procesio de pli ol 800 homoj, inter ili

grandparte esperantistoj el la tuta regiono. En la tombejo antaŭ la ĉerko dum forta pluvo eksonis la funebraj paroladoj en ĉeĥa kaj internacia lingvo. Parolis k-do de la E-rondeto en Kopřivnice, por la regiono Ostrava k-do Slaný, en la nomo de MEM adiaŭis kun k-do Zanáška k-do Burda el Plzeň, kiu ankaŭ metis florkronon sur la tombon kun verda rubando kaj Esp-lingva surskribo: "LASTAN SALUTON DE LA MONDPACA ESPERANTIS'TA MOVADO" kaj reprezentantoj de la muzeo kaj de uzinaj organizoj. Fine katolika pastro akcentis ĉiujn meritojn de la mortinto, substrekante liajn favorajn kaj utilajn klopodojn por Esperanto, kaj por la mondpaco. La funebra ceremonio malgraŭ la forta pluvo daŭris ĝis la 18 kaj 1/2 horo. Dank' al k-dino M.Hrčková ĉio procedis en plej modela ordo kaj tuj post la funebro la lokaj esperantistoj kun siaj esp. gastoj kunvenis en la klubejo por decidi pri la plua agado de sia rondeto. Oni aprobis unuamane, ke k-dino Marta Hrčková estu la ideologia gvidantino de la rondeto kaj kelkaj gek-doĵ tuj aligis ŝin afable subteni per aktiva kunlaboro. La esperantistoj en Kopřivnice kolektis monon por florkrono el kiu restis 350.-Kčs, kiujn ili decidis, honore al la klopodoj de k-do Zanáška, uzi por propagando de Esperanto. La ĉeestintoj promesis daŭre zorgi pri la distribuado de LA PAGDEFENDANTO kaj estonte laŭ ebleco transpreni ankaŭ ĝian multobligadon.

Kamarado Zanáška mortis - sed liaj klopodoj ne estis vanaj. Ideologie de li edukita kolektivo honore al la morta k-do daŭrigos kun komunaj fortoj la de li komencitan verkon, kaj la nomo Rudolf Z a n á ŝ k a daŭre impulsos al ankoraŭ pli aktiva kaj persista batalo por la fina venko de Esperanto por garantii la mondpacon.

Rud.Burda

ADMINISTRVAJ MALHELPOJ DEVAS MALAPERI!

La kultura komisiono de la Londa Packonsilantaro kiu kunvenis en eksterordinara kunsido la 24-28. de majo en Berlino rekomendis jenan rezolucion:

1/ La lastaj monatoj eminentis per iniciatemaj sukcesoj en la sfero de kulturaj interŝanĝoj. Okazis kelkaj kongresoj de spiritaj laborantoj, prezentiĝis sukcesoj en la sfero de teatroarto kaj kinematagrafio, vizitoj de delegitaroj, estis festitaj la datrevenoj de grandaj personoj kaj eminentaj verkaĵoj, okazis kunvenoj de instruistoj, artistoj, studentoj, sportuloj ktp. Ĉi ĉio argumentas, ke la nacioj deziras interŝanĝi la fruktojn de siaj laboro kaj teknikaj progresoj kaj ankaŭ la sukcesojn en la sfero de arto kaj scienco.

2/ Samtempe naskiĝis kaj disvastiĝas grandaj naciaj movadoj, kies celoj estas evoluigi la folkloran kulturon de ĉiu lando kaj igi la homajn sciojn propraĵo al la plej larĝaj popolamasoj. Tiuj movadoj stariĝas kontraŭ ĉiu ajn subpremo de naciaj kulturoj, ĉar similaj eksperimentoj estas atakoj kontraŭ la landa suvereneco, kaj klopodas kontribui al kreado de tiaj verkoj, kiuj pliriĉigas la kulturenan trezoron de ĉiu nacio kaj kontribuas al disvastigo de internaciaj rilatoj.

3/ Tiuj rezultoj atingitaj en la sfero de kulturaj rilatoj kaj evoluo de naciaj kulturoj, kvankam ĝojigaj, tamen ne estas kontentigaj rilate al la nunaj eblecoj. Ankoraŭ ekzistas multaj baroj, kiuj malhelpas al la klopodoj elĉerpi la homan prudenton. Estas ne pensebla, ke eblas ankoraŭ krei administrativajn aŭ politikajn barojn, malhelpante liberan esprimon de ideoj, translokigon de homoj kaj interŝanĝon de kulturaj verkoj.

Tiuj ĉi baroj devas malaperi!

Ili malaperos, se ĉiu homo, kiu amas la kulturon, konsciiĝos pri sia respondeco kaj persiste subtenos ĉiun ajn iniciativon venantan de kie ajn kun la celo likvidi tiujn ĉi barojn en la intereso de la plua evoluado de la nacia kulturagado kaj plivastigado de reciprokaj interŝanĝoj. La deziro de la nacioj estas, ke la kulturo servu al interamikiĝo kaj paco inter la popoloj.

Ni publikis ĉi rezolucion, por ke ĝi servu al niaj gek-doj en lokoj, kie ankoraŭ ekzistas la cititaj administrativaj aŭ politikaj baroj k. malhelpoj.

Ĝin ili povas uzi kiel trafan argumenton en ilia rezista batalo kontraŭ la homoj, kiuj malhelpas al la esperantista pacmovado en iuj landoj.

ĜENEVO = 0 : 0

Denove montriĝis veraj la vortoj de kamarado Stalin, nome: ke la paco estos garantiota nur tiam kiam la popoloj mem prenos ĝian defendon en siajn manojn.

Ĉiuj homoj povis konvinkiĝi, ke la rezultoj akiritaj dun 51 tagaj traktadoj en la ĝeneva konferenco egalas nulon.

51 tagojn diversaj ministroj, diplomatoj kaj armeo da ĵurnalistoj, tradukistoj, ktp. gaje diboĉadis, prezentante unu partio al alia senĉesajn bankedojn dum kiuj oni manĝegis kaj drinkadis, dezirante unu al la alia sukcesan agadon en la konferenco, sed finfine el tiu longtempa agado naskiĝis nur granda nulo. La konferenco finiĝis, ĉar la du kunvenintaj partioj ne kapablis interkonsenti finigi la sensencan hombuĉadon en Koreio k. Indonezio.

Koreia ĵurnalo "NODON SIMMUM" skribas:

La konferenco fiaskis kaŭze de senĉesa persisteco de la usonaj reprezentantoj kaj iliaj satelitaj ŝtatoj, kiuj jam de komence kontraŭis ĉiujn konstruktivajn proponojn de la koreia kaj ĉinia popol-respublikoj kaj Sovjetunio. La usonaj imperialistoj kaj la regantaj klikoj de iliaj sateligitaj landoj estas nun respondecaj pri la ĝeneva fiasko.

Kion skribas la ĵurnaloj de la alia partio, ni ankoraŭ ne eksciis, sed ni opinias, ke verŝajne same ili ŝovas nun la kulpon je la Sovjetunio por povi daŭrigi en tiu ĉi bela komedio, kiu alportas por ili daŭran profiton kaj por la popoloj mizeron kaj morton.

Burda, Rudolf

EL NIA FRATA ORGANIZO

El Wroclaw, la filio de la Pola Esperantista Ligo ni ricevis jenan interesan raporton.

"Sur nia modesta posteno ni faras nian plejebilon en la konataj kondiĉoj. La vivo de nia grupo ne abundas je okulfrapaj sukcesoj, sed ni konscias, ke ni faras laŭ niaj eblecoj gravan kaj bezonan laboron. La kunvenoj (ofte kun interesa programo), okazas regule ĉiusemajne, ankaŭ regule funkcias kursoj por komencantoj dufoje en jaro. Dum somera tempo ni aranĝas turismajn kaj ripoz-ekskursojn.

Nia eldonado, kiu en la antaŭaj jaroj bone funkciis, iom stagnis dum la pasintaj 12 monato. Pro internaj teknikaj malfacilaĵoj ni ne sukcesis jam de post pli ol unu jaro eldoni nian esperantlingvan bultenon "Vroclavano", sed espereble post ne longe

ni tamen aperigos tiun bultnon. Same ni esperas povi baldaŭ eldoni la 4a n-on de nia pollingva gazeto "Glos esperantistow." Laŭ instigo en la 7a n-o de PACO ni ankaŭ sendis salutleteron al la 10a kongreso de la Ĉeĥoslovaka Komunista Partio.

NIAJ KONTAKTOJ KUN LA NACIA PACMOVADO

En Ostrava kontaktis k-doj Lička, Škvrna kaj Kočvara kun reprezentanto de la loka pacmovado koncerne kunlaboro kun la esperantistaj pacdefendantoj. La definitivaj agadoj devis esti prokrastitaj pro la ĵus kurinta balota kampanjo.

En Doksy niaj kamaradoj sukcesis akiri la distriktan packomitaton por akcepti protektaton pri la Somera Esperanto Kolegio (kursoj) okazantaj de 15 julio en Doksy. En Opava daŭre kunlaboras niaj kamaradoj kun la loka packomitato sub gvido de k-do .Frantl . En Plzeň post longdaŭra traktado finfine la regiona packomitato invitas regule niajn reprezentantojn al siaj entreprenoj. La prezidanto de tiu komitato ankaŭ promesis kunlabori okaze de vizito de aŭstralia pacdefendanto d-ro. Ben Cass kun la lokaj esperantistoj.

Certe ankaŭ jam en aliaj lokoj niaj grupoj sukcesis ielaniere ligi kontakton kun la loka pacmovado, sed bedaŭrinde ĉiam forgesas sendi al ni siajn raportojn. Ni esperu, ke por la venonta n-o vi tiel faros.

FOR LA MANOJN DE GVATEM ALA!

En la lasta monato okazis krima agreso kontraŭ la sendependeco kaj nacia suvereneco de la popolo gvatemala. La atako estis inscenita de la usonaj „United Fruit Company" trustoj, kiuj pro la decidoj de la progresema registaro en Gvatemalo timas perdi la ĝisnunajn privilegiojn ekspluati senkompate la gvatemalan popolon. La registaro faris decidojn por plibonigi la situacion de sia popolo, tuŝinte iomete la profitakiremajn poŝojn de la amerikaj kapitalistoj. Tio ilin treege kolerigis kaj sekve ili aranĝis puĉon kontraŭ registaro de pacama popolo, kiu mem neniel enniksiĝis en aferojn de aliaj landoj.

Kiel apostoloj de nia majstro L.Zamenhof, kiu kreis la lingvon por atingi pacon inter la popoloj, ni sentas la devon akre protesti kontraŭ tiu ĉi nova agreso de usonaj kapitalistoj kaj vokas insiste: For la krimajn manojn de Gvatemala!

Ni vokas samtempe ĉiujn amerikajn esperantistojn, kiuj sincere sekvas la vojon de nia majstro, ke nun ili havas trafan okazon laŭtigi siajn voĉojn kontraŭ malamikoj de paco en sia propra kontinento. Estas la sankta devo de ĉiu amerika esperantisto per sia tuta forto apogi la volon de la pacama gvatemala popolo kaj diskonigi k. kontraŭbatali tiun ĉi novan krimon de la usoraj kapitalistoj, por ke la popoloj de ĉiuj amerikaj landoj solidarece helpu kaj subtenu la pacaman Gvatemalon.

GRAVA KONTRIBUO AL LA PACO

Por la II. dimanĉo de julio la Franca pacmovado proponis "Grandan tagon de civitana agado por la sendependeco kaj paco". Ĝi alvokis ĉiujn Francojn, kiuj amas sian patrion kaj pacon, ke ili aranĝu vastan kampanjon el kiu delegitoj el ĉiuj tavoloj de la popolo prezentu al siaj urbestroj kaj magistratoj rezoluciojn de la popolo por la sendependeco kaj paco en Francio. Ankaŭ la Franca Esperantista Packomitato aktive partoprenis tiun ĉi kampanjon. En Flugfolio distribuita inter francaj esperantistoj, ĝia

sekretario W. Gilbert diras: ke ĉiu disĉiplo de d-ro.Zamenhof, scianta el siaj internaciaj rilatoj sen la lingvaj baroj, ke ĉiuj popoloj volas la pacon, devas nun laŭte diri sian volon, por plifortigi la pacvolon de la franca popolo. Li vokas la esp-istojn, turni sin al la uzinaj kaj lokaj packomitatoj, sendi rekte al la Franca Esperanto Packomitato siajn dezirojn kaj petojn por la paco.

PACILO

la lingvo internacia estas frukto de profunda sopiro k. alta idealo de la aŭtoro ekstermi miskomprenon. Tial ni esperantistoj vidas en ĝi la plej necesan kaj neeviteblan fundamenton por mondopaco.

Esperantistoj de ĉiuj mondpartoj, kiuj volas sekvi nian majstron, inspirataj de frata spirito, ne povas stari neŭtralaj antaŭ la granda afero – Mondopaco.

Tial, tutmonda esperantistaro unuiĝu per Esperanto por Mondopaco!

Kristofer Grimsson

membro de la konsilantaro de Kontraŭarmea Movado en Islando.

KRISTINN E. ANDERSSON, membro de la Mondopaca konsilantaro

skribis al la islanda redakcio de la MEM-organo, PACO, jenan leteron:

Karaj amikoj!

Mi deziras esprimi mian plezuron pro tio, ke via Esperanto-gaz. PACO, tiufoje estas eldonata en Islando.

Estas klare al mi, kiom grava faktoro komuna lingve povas esti kreskiganta komprenon kaj amikecon inter nacioj kaj tio fortigi fortojn de paco kaj pacvolemon en la mondo. Ĉe konresoj kiam kunvenas delegitoj de plej malsimildevenaj nacioj estas la plej malfaciliga baro, ke ĉiuj nacioj ne komprenas komunan lingvon.

Estas plezuro al mi scii, ke inter islandaj esperantistoj estas la plej antaŭaj pacbatalantoj ĉilandaj, kiel la verkisto Torbergur Tordarson kaj aliaj.

Vivu la paco kaj kunlaboro inter ĉiuj nacioj!

Kristinna E. Andresson

Ambaŭ ĉi supre menciitaj leteroj estas prenitaj el islanda PACO.

NIA KAMPANJO PROKSIMIĜAS

Ordinare dum la belaj someraj tagoj la organiza vivo stagnas, ĉar la homoj preferas iri en la naturon, anstataŭ viziti kunvenojn kaj klubajn vesperojn. Kvankam tio por la societa vivo domaĝas, tamen tio estas pardonebla kaj komprenebla. Sed same kiel en aliaj organizoj, ankaŭ en la esperantistaj ekzistas multaj membroj, kiuj eĉ dum la aŭtunaj kaj vintraj tagoj opinias, ke ilia ĉeesto ne estas necesa, ke aliaj anstataŭos ilin, kaj restas for de nia movado. Speciale ofte tiel opinias malnovaj, perfektaj kaj plimaljunaj niaj gekamaradoj.

En la partio oni nomas tian konduton „Oportunismo” kaj akre batalas kontraŭ ĝi, ĉar oportunismo ege domaĝas al la organiza vivo. Se la gvidantoj de fortaj organizoj timas tiun ĉi oportunismon, kial ne ankaŭ ni, esperantistoj, vidu ĝin kaj klopodu ekstermi tiun danĝeron el niaj vicoj? Kion utilas al nia movado miloj da perfektaj esp-istoj, kiam ili troviĝas ekster la kadro de niaj organizoj – kiam ili ne trovas necesa almenaŭ unufoje dum la semajno aŭ dum du semajnoj partopreni niajn

kunvenojn kaj klubvesperojn? Kion utilas la senlaca klopodo de kelkaj fidelaj kaj aktivaj gekamaradoj, kiuj daŭre arigas ĉirkaŭ si novajn adeptojn por nia ideo, se tiuj, venante en la klubon renkontiĝas nur kun komencantoj kaj ne havas eblecon aŭdi paroli perfektajn malnovajn esperantistojn? En iliaj cerboj naskiĝas la penso, ke estas veraj la kalumniaj paroloj, disvastigitaj de niaj kontraŭuloj, ke Esperanto estas eksperimento iluzia, kiu ne havas estontecon, ke ne ekzistas faktaj esperantistoj, fariĝas fiksa kredo, se ili ne vidas malnovajn, spertajn esp-istojn inter ni. Kaj kredo, ke ankaŭ tiuj kelkaj aktivaj geka-doj, naŭzigitaj pro la neintereso de aliaj, foje povus lacigi, kio poste kondukus al memlikvidiĝo de nia movado. Estas vere domaĝo, ke ni devas uzi tioman lokon de nia bulteno, kiun ni urĝe bezonus por pli gravaj raportoj, sed necesas absolute ke ni foje voku la konsciencon de tiuj esp-istoj, kiuj per sia indiferenteco grave minacas nian movadon, dume aliaj ofertas ĉiujn siajn fortojn por ĝia resaniĝo.

La sezono de nova societa vivo rapide alproksimiĝas. Necesas, ke jam de nun ni faru ĉiujn necesajn preparojn por ĝia sukcesalporta procedo. Multaj grupoj eĉ dum someraj tagoj diligente laboris por afero, sed nun necesas, ke ankaŭ tiuj, kiuj longe ripozis ĝuinte la belan naturon almetu siajn manojn oor konstrui nian verkon! Kvankam ne en ĉiuj lokoj de nia lando Esp-o renkontiĝas kun simpatis oficiala, tamen oni nefacile povas rifuzi lingvon, kies tasko estas servi al la mondpaco. Tion devas niaj propagandistoj dum ilia agado forte akcenti. Ili devas klopodi en ĉiu loko atingi amikecan kontakton kun la nac.packomitatoj por doni Esp-on en la servon de la paco. Se ni deziras, ke nia movado est aprobata kaj nia agado oficiale subtenata, tiam necesas aktivigi ĉiujn niajn gek-dojn por ke nia movado antaŭ ĉio fariĝu per sia amplekseco respektinda. Jam nun ni devas kolekti la adresojn de novaj adeptoj, por inviti ilin poste al niaj aŭtunaj kursoj. Ni devas elekti kaj eduki instruistojn, kiuj kapablos pedagogie kaj psikologie eduki novajn samideanojn. Nia administracio faras ĉion eblan, por povi liveri la necesajn lernolibrojn, eĉ se tiuj estus nur ciklostilitaj.

En lokoj, kie niaj k-doj posedas klubejon, estas tre rekomendinda, prepari kursojn por infanoj. Inter ni estas multaj profesiaj instruistoj-esp-istoj, kiuj povas multe helpi en tiu afero. Aliel ni kontaktu kun la infanoj rekte. Ni klopodu entrepreni ankaŭ la sindikatojn, junular- kaj ceterajn organizojn, en kiuj jam de nun kapablaj k-doj prezentu siajn eksterl. Raportojn por prepari la kampon por niaj aŭtunaj kursoj. Se ĉiuj, inkluzive la ĝis nun pasivaj k-doj eklaboros, la sukcesoj nin certe poste kontentigos. R. Burda

FINFINE ĜOJIGA KOMENCO

Antaŭ la ĉiela pordo staras homo.
Demandite pri deveno, lia nomo,
time montras li libregon de pasporto
kun permes-atestoj por la homtransporto
trans la iom multaj limoj sur la tero
inter landoj, maroj, eĉ en la aero.
Ankaŭ estis enstammpitaj multaj vizoj,
komprenible nur post pago de kotizoj.

Limoj donas bonintence – krom evito
de l' senlaboreco – iom da profito.
Sankta Petro pri la libro laŭte ridas:
"Senerare, tute klare mi ekvidas
jam de malproksime, malgraŭ eĉ miopo,
tiu povra homo venas el Eŭropo!"
Por ekstermi sur la tero la malklaron,
la "Ĉiel-ofico" sendu la deklaron:
"Ni informas vin en nom' de "Tutĉielo"
ke en niaj regionoj estas "LIMO"
same ne konata vorto kiel "TIMO"!
Tial estas por "Teranoj" post la morto
tute superfluaĵ vizoj kaj pasporto!"

De Josef BURGER, Sarlando

ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKAJ POPOLKONSILANTAROJ

Dun la tutŝtataj balotoj por la popolkonsilantaroj (Naciaj komitatoj) en Ĉeĥoslovakio estis elektitaj en la regionan konsilantaron de urbo Olomouc por la 55. distrikto, k-do. J. Vašek, prez. de la Esp.-rondeto ĉe la uzina kluon de fervojistoj en Olomouc. En la sama urbo estis elektita k-dino K. Hlobilová por la urba konsilantaro. Por la distrikta konsilantaro en Nový Jičín estis elektita k-dino Marta Hřčková, gvidantino de Esp-klubo ĉe Uzinoj TATRA en Kopřivnice. En la popolan konsilantaron de la kvartalo Ostrava-Zábřeh estis elektita k-do Jindřich Velký, membro de la loka Esperanto-rondeto. Ni gratulas al la novelektitaj gekamaradoj en la espero, ke ili sukcesos ankaŭ por Esperanto esti helpemaj el la titolo de iliaj honoraj funkcioj.

Nia redakcio havas eminentan intereson ekscii ankaŭ, kiuj gek-doj estis elektitaj en aliaj lokoj de nia lando.

El "INFORMILO"-Haná-Jeseníky

TUTMONDAJ POŝTISTOJ ATENTU!

La ĉeĥoslovaka ministerio de poŝto kaj telegrafo eldonas pere de a poŝtista sindikato fakan gazeton nomatan "SPOJ" (Komunikilo), kiu raportas pri la vivo k. laboro de poŝtistoj.

Dum konferenco de la redakcio kun la legantoj multaj poŝtistoj esprimis la deziron, ke la redaktoroj aperigu pli da raportoj pri la vivo kaj laboro de eksterlandaj poŝtistoj, se eble kun bildoj, kaj precipe el landoj kapitalistaj. La ĉefredaktoro respondis, ke bedaŭrinde por tio mankas la necesa uzebla materialo.

Ĉeestinta esp-k-do aliĝis kaj proponis, ke li estas preta la koncernan materialon prizorgi, sub la kondiĉo, ke sub ĉiu de li liverota raporto estu menciata la nomo de la aŭtoro kaj la Esp-rondeto, kiu la raporton peris.

La ĉefredaktoro konsentis kaj promesis, ke ĉiu konvena raporto estos publikota kaj kome la redakcio liveros po 1 ekz. al la aŭtoro.

Ĉar al ni tute mankas eblecoj, por montri praktike la valoron de Esperanto, estas tiu ĉi okazo por ni altsignifa.

Ni pro tio petas niajn legantojn, prezenti ĉi raporton al eksterlandaj poŝtistoj kun la peto, ke sendu siajn raportojn kun Esp-traduko pri sia vivo, faklaboro k. pacmovado en la granda, tutmonda poŝtista familio por nia redakcio "SPOJ", se eble akonpanate de fotoj por publikigi. Ni ankaŭ prizorgas kolektian korespondadon kun eksterlandaj poŝtistaj organizoj.

Tiu ĉi entrepreno estas la unua paŝo por atingi pli poste eble eldonon de ĉeĥoslovaka esperantista poŝtmarko.

Skribu al: Poŝtista Esperanto-Rondeto, Krajská správa spojů, Tylova ul. P L Z E Ń, Ĉeĥoslovakio.

DU ESPERANTO-KONGRESOJ

En majo okazis kongreso de tutŝtataj Esp-rondetoj, kiun aranĝis la Esp-rondeto en urbo Přerov. Nun ni povas legi en la Bulteno de Esp.-klubo en Praha n-o 16.kaj en HEROLDO de Esperanto (julio), ke en septembro okazos denove Tutŝtata kongreso de ĉsl.esp-istoj en urbo Otrokovice, kiun kunvokas uzina rondeto de ROH el Otrokovice. La PACDEFENDANTO preskaŭ ne havas en tiu urbo abonanton! Estas interesa, ke ĉiuj programas sub nia losungo: PER ESPERANTO POR MONDPACO, kvarkam ni ĝis nun nenion ekaŭdis pri iliaj agoj en tiu senco. La esp-istaj pacdefendantoj certe bonvenigus ĉiun entreprenon, se ĝi estus sincere opiniata, sed ĉi tie ŝajnas io ne esti en bona ordo.

Unue estas superflua, aranĝi dum unu jaro kongresojn kaj due estas dubinda, kiu iniciatas tiajn aranĝojn, ĵus en la tempo, kiam ankoraŭ necesas labori formike kaj ne tro brue por antaŭ ĉio konstrui firman fundamenton, necesan por nia estonta agado. Antaŭ ĉio necesas eduki verajn esperantistajn pacdefendantojn por povi poste publike kaj sentinte prezenti ilin amase al tiuj, kiuj ĝis nun malfavoras novan movadon. Ne sufiĉas nur ŝanĝi la firmaon kaj prezenti malnovan inventaron, kiu antaŭ 3 jaroj subigis al inspirita preteksto, ke Esperanto jam finludis sian rolon en ĈSR kaj mem likvidiĝis.

De tiu tempo la pacmovado esperantista komencis en nia lando sian agadon kaj ĝis nun sukcesplene progresis. Ĝia ĉefa merito estas, ke ĝi per sia persista kaj celkonscia agado preskaŭ sukcesis forigi la tiam de oficialaj organoj klare esprimitan tendencon, likvidi Esperanto en Ĉeĥoslovakio.

Nun venas al la scenejo aliaj homoj, kiuj klopodas alproprigi al si tiujn meritojn. HEROLDO de Esperanto kaj la Bulteno de la E-klubo en Praha ankoraŭ ne trovis inda almenaŭ menciitajn la fondiĝon de la MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM). La enhavo de tiuj organoj estas konstante la sama. Stranga estas ilia "NEŬTRALECO" inter paco kaj la milito. La INTERNA IDEO de d-ro L.L. Zamenhof restas al ili fremda. La ĉsl. Esperantistoj-pacdefendantoj ankoraŭ ne aranĝis tutŝtatan kongreson, sed ili laboras kolektive kaj individue por eduki antaŭ ĉio bonegajn kongresantojn. Alimaniere kongreso, dum la nuna situacio, povus nur kaŭzi fiaskon kaj eĉ minacantan endanĝerigon de nia ĝis nun bone prosperanta esperantista pacmovado.

R. Burda

OSTRAVA FUNEBRAS

Jjus antaŭ la redakcia fino atingis nin ege malgaja raporto pri la morto de nia fidela k-do

Alois KUBALA en Ostrava

Post longdaŭra stomaka malsano la 11-an de julio je la 11 ¼ horo li elspiris sian animon. La solena funebra ceremonio okazis la 13/7. je la 16 horo en la krematorio de urbo Ostrava, kiun partoprenis ĉiuj esperantistoj.

K-do Kubala estis esp-isto de la jaro 1906. En 1921 ankoraŭ kun aliaj k-doĵ li fondis la klubon en Slezská Ostrava. En 1946 li kunfondis duan klubon en Ostrava-Zábřeh. Pere de li estis tie inaŭgurita Esperanto-monumento honore al J. A. Komenský kaj d-ro Zamenhof. Malgraŭ sia grava malsano, k-do Alois Kubala entuziasme partoprenis la Esp-movadon kaj ankoraŭ ligita al malsanula lito li verkis porpacajn poemojn kaj instigis per leteroj siajn amikojn al persisteco kaj aktiva laboro ĝis la lasta momento antaŭ la morto. Antaŭ kelkaj tagoj li ankoraŭ sendis 10,- Kč kiel "MUNICION POR NIA BATALO".

Ĉiuj esp.-pacdefendantoj alte estimas kaj honore memoros lian imitindan agadon. Nia redakcio esprimas sian dankon por lia konlaboro kaj profundan kondolencon al lia estimata familio.

NIA MIGRANTA BIBLIOTEKO

Ĝis la 20 de junio donacis al nia biblioteko niaj legantoj 50 librojn. La dispruntado jam funkcias, kaj la intereso pri la libroj, kiuj estas plejparte ne alireblaj, eksterlandaj novaĵoj, daŭre kreskas. Interesuloj petu katalogon por elekti libron ĉe nia bibliotekisto: Kdo. Alois Zmeškal, Praha I, Celetná č. 2. Krome ni ankoraŭ petas pri donaco de rezervaj libroj kaj broŝuroj por forigi la mankon de literaturo en CSSR. Al eksterlandaj k-doĵ ni rekompencos per senpagaj jarabonoj.

NIA MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

TŘINEC, la 20. de junio okazis tradicia ekskurso al monto Ĉantoria, kie okazis konferenco de esperantistoj el la regionoj Ostrava kaj Olomouc. Detalan raporton la redakcio ne ricevis.

PŘÍBOR de la 18-31 de julio okazos Someraj Esperanto Kursoj sub gvido de k-do Theodor Čejka. Kursotizo, manĝado kaj loĝado kostos 320-350 Kčs. Kiu ĝustatempe aliĝos, ricevos 50 % fervojrabaton. Informu vin ĉe: k-do Antonín Sattk, Dvořákova 744, Příbor, Moravio.

OPAVA, la 3. Somera Esperanto-Kursaro sub tendoj en valo de rivero Moravice, Silezia, okazos en 3 terminoj de 5 julio – 15. aŭgusto 1954. La 14 taga tendara vivo kun manĝado kaj kursotizo kostos 200-220 Kčs. Detalajn informojn petu ĉe: K-do. Jar. Kuzník, Roosveltova č.17, Opava, Moravio .

PŘEROV, tutŝtatan konferencon de E-rondetoj, okazinta en majo, partoprenis 187 delgitoj el 51 lokoj. La interkonatiĝan vesperon ĉeestis ĉ. 260 personoj. Inter la ĉefaj programpunktoj estis intensiva laboro per Esp-o por la mondopaco. Partoprenis

oficialaj reprezentantoj de la urba kaj regiona Nacia Komitatoj, kiuj promesis al la Esp. movado dediĉi pli intensivan subtenon.

SKORONICE. K-do.Lunga ellernis tie kelkajn junulojn kaj promesas en aŭtuno tie fondi Esp-rondeton.

OSTRAVA, la prelegoj de k-do Jos. Pech el Plzeň, okazintaj en nia regiono tre bone sukcesis. Krome okazis priesperanta parolado en najbara urbo Místek, du estis ĉe la kultura klubo en Zábřeh kaj aliaj du en la kult. klubo de la uzino V. Molotov. Dum la reveturo k-do.Pech ankoraŭ parolis en la urbo Olomouc. La paroladon jam abonis reprez. de la kult.klubo en urbo Hlučín por la aŭtuno.

HRADEC u OPAVA, en nia urbo okazos la tutŝtata konferenco de E.Junulago la 1.de aŭgusto. Interkonatiĝa vespero estos sabate la 31.de julio. Partoprenantoj ricevas 50 % fervojrabaton. Aliĝu ĉe k-do Jaroslav KUZNIK, Opava, Rooseveltova 17.

OLOMOUC, la klubo denove kunvenadas en sia iama klubejo, Masaryk-placo 25/II ĉiu ĵaŭde de 19.horo. La junularo ĉiu marde de 18. horo.

Ĉ.BUDĚJOVICE, nia klubo translokiĝis el Šumavská str.250 al str. Máchova n-o . 280.

Místek, okaze de la laborkonferenco de Esp-rondetoj el la regionoj Ostrava kaj Olomouc, fondiĝis nova Esp-rondeto ĉe la uzina klubo SLEZAN en urbo Místek.

PRARA, la kunvenoj de la klubo okazas ĉiu merkrede de 20 horo en "Ženský Klub", Praha II -Smečky.

NI PETAS ĈIUJN LEGANTOJN SENDI AL NI BALDAŬ SIAJN RAPORTOJN POR NIA VENONTA ELDONO.

PRI D-RO BEN C A S S

Kun bedaŭro ni devas konstati, ke tiu ĉi d-ro nur volis eluzi nian helpon kiam al li ne prezentis aliaj pli bonaj avantaĝoj. Dum lia ŝipvojaĝo li tre verŝajne aliĝis ĉe delegacio de aŭstraliaj pacdefendantoj por partopreni la konferencon en Berlino, de kie li jam sendis al sia amiko Bennett en Australio saluton. Kvanam niaj k-doĵ en diversaj lokoj kaj landoj ĉion preparis por ebligi al li prelegojn kaj agrablan gastigadon, la d-ro eĉ ne trovis inda ilin almenaŭ informi per simpla poŝtkarto pri sia vortrompo. Kelkloke niaj gekamaradoj al li dankas pro la rikoltita fiasko, kiu instruis nin, esti en la estonto malpli fidemaj al similaj proponoj, por ne rikolti denove ridon kaj fiaskon. Ni estas scivolemaj, kiel respondos lia amiko St. Bernett, kiu la aferon peris je nia plendo.

EL BULGARIO

La 27-28. de marto 1954 ĉeestis la jarkunvenon de la BULGARA ESP. KOOPERATIVO 59 kooperativanoj el diversaj lokoj de Bulgario.

En la jarraporto la direktoro de la BEK komunikis pri plibonigo de la financa stato kaj plimultigo de kooperativanoj. Post fermo de la oficiala kunveno okazis ne oficiala konferenco de Bulgara Esperanto Asocioo, kiun partoprenis 20 gek-doĵ. Post debato pri la bulgara E- novado kaj politika situacio la ĉeestintoj decidis, prepari eldonadon de multobligota informa bulteno. Se tiu ĉi decido efektiviĝos, la bulgar.

Esp-istoj kredas, ke la landa Esp-movado tre baldaŭ enviciĝos la fronton de la tutmondaj pacdefendantoj.

Liubomir Leviĉaroff

Ul. "Iu Nenof" 13, PAZARĜIK, Bulgar.
VARBU NOVAJN ABONANTOJN por L.P.!

M E N D U Ĉ E N I A D I S T R I B U E J O :

Adreso: K-o. Josef REISER, Kraj. Správa spojů, PLZEŇ

Klimsza Emil: Lernolibro de Esperanto kun aldonoj	11.-Kĉs
Majerová Marie: Urbo sub signo de fajro	6.- "
Šupichová Julie: Hovoříme esperantsky (por konversacio)	6.- "
Ĉeĥa ŝlosilo de esperanto (havebla nur po unu ekz.)	2.50"
Saluton el ĈSR (havebla po unu ekzemplero)	2.- "
La plejforta voĉo do la paco (ĉina eldono)	3.- "
Por nova afero nova maniero (ĉina eldono)	5.- "
Macukaua (15 paĝa broŝuro, jaĥpana eldono)	1.50"
<u>Propaganda materialo:</u>	
Esp-insigno (verda stelo sur blanka emajlo - ø13 mm)	3.-"
Informa tabulo (emajla, surskribo: ESPERANTO INFORMO)	20.-"
Esperanto-kongreso en Liberec (foto)	8.-"
Esperanto-kongreso en Košice (granda luksa foto)	20.-"
Granda propaganda afiŝo por kursoj, 5 ekz.	1.-"
Malgranda " " "	1.-"
4 ĉinaj pacafiŝoj (belkoloraj) kun Esp.kaj ĉeĥa klarigo	1.-"
10 E-pacpropag.leterpaperoj kun kovertoj kaj 1 glum.	2.20"
10 " " luksaj kovertoj kaj 1 glumarko	3.20"
10 Esp-pacglumarkoj	-.50"
10 poŝtkartoj: ESPSEANTO POR LA MONDPACO kun 1 glum.	1.70"
10 ESPERANTO LINGVO INTERNACIA kaj 1 glum.	1.20"
10 de SAT (belkoloraj) kun 1 glum	2.20"
10 Esp-monumento en Ostrava (foto)	6.- "
10 L.L.Zamenhof (portreto)	3.- "
10 NUR ANTAŬEN, kanto kun muziknotoj	2.- "
<u>Diversaj unuopaj broŝuroj eldonitaj eksterlande</u>	po 1.-10.-Kĉs
Poŝtafrankon ni alkalkulas.	

MUNICIO POR NIA BATALO

K-do Milan Neubeler, Poprad,	10, -
K-do.Vlad.Sládeček, Karviná	2.-
K-do.Karel Švec, Kežmarok	2.-
K-do. Alois Zmeškal, Praha	6, -
K-do.R.Janečka, Jablonec n/N	10.-

K-do.Jan Toufar, Šebrov	10,-
K-do Frant.Skoupý, Brno	5.-
K-do J. Patera, Frant.Lázně	10,-
K-dino.Ž.Jankuová.Bardejov	5, -
K-dino.M.Peinlová, Č. Budějovice	2,-
K-do.P.Tichota, Rybáře, K. Vary	10,-
K-do.A.Kubala, Ostrava-Zábř.	10.-

Ĉiuj akceptu la plej sinceran dankon de la redakcio.

KOMUNIKO

Vane vi atendis nian junian n-on. La tuta eldono, krom por la regiono PLZEŇ, perdiĝis ĉe la poŝto dum la transporto de la presejo en Plzeň al nia distribuejo en Kopřivnice. Post serĉado pli ol 1 monata la poŝto ankoraŭ ne trovis la sendaĵon. Pro financaj kaŭzoj ne eblas nova eldono. Parte vi estas rekompecataj per tiu ĉi n-ro, kiu valoras por julio kaj aŭgusto.

BONVOLU NOTI!

Denove venas la vico je nia redakcio, eldoni en septembro la oficialan organon de MEM – "PACO". Ĉar ne eblas al ni eldoni du gazetojn dum unu monato, ni liveros al ĉiuj niaj legantoj "PACO"n, kiu tre verŝajne estos 10 paĝa kun 2 paĝa aldono de LA PACDEFENDANTO. Jen plua rekompenco por la perdita junia n-o.

KORESPONDI DEZIRAS:

Unufoja korespondanonco kostas 2,-Kĉs aŭ 3 int.resp.kuponojn. Ĉiu anoncanto estas devigata almenaŭ unufoje respondi al ĉiu petanto. Niaj eksterlandaj legantoj estas petataj interpreti vastan korespondeblecon, ĉar tiu grave kontribuas al internacia solidareco kaj firmigas la mondpacon.

K-do Kaichira Fujihara, Hachinama, Okayma-ken, Japanio (22 jara) pri muziko, literaturo kaj matematiko kun ĉiuj landoj.

K-do Bohumil HORÁK, Dvořákova 31, PŘEROV, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj per il. p.k. Kaj leteroj. Interŝanĝas gazetojn, afiŝojn kaj folklorajojn. Certe respondas.

K-do Pavel ŠŤASTNÝ (11 jara), PLZEŇ, Němcova č. 4, Ĉeĥoslovakio, kun tutmondaj infanoj. Interŝanĝas il. p.k. pm., desegnaĵojn ktp. Certe respondas al ĉiu.

K-do POWIDZKI Tadeusz , profesoro de liceo de belaj artoj, SZCZECIN al Piastow l, B, Polio, kun tuta mondo pri muziko, arto, literaturo kaj pentrado. Certe rap.resp.

K-do.Vojín, Václav HIUTTER, PS 3, DOBRUŠKA u Náchoda/soldato/ pri pacmovado.Interŝ.il.r.k., k.ĉ.l.

K-do.Václav REISER, Telegrafní dílna, Solní č.20, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, interŝ.filatele afr.il, pk. uzitajn kaj ne uzit.pm.,kun č.l.

K-do.B.ENOMOTO, Laifan Síngu, WAKAYAMAKEN, Japanio, pri sciaj kaj politikaj aferoj,

k-do Jindřich VONDRÁČEK, Radyňská ul. č.325, STARŽ PLZENEC, Ĉeĥoslovakio, /19jara stud./kun ĉiuj landoj, interŝ.il.k, k., gaz.ktp.

K-do.Seinosuke KATO, Ĉiriu-maĉi, Hekkai-gun, Aiĉi-ken, Japanio, /59 jara oficisto de kcriununo/kun ĉiuj landoj.

K-do Pavel LIPKA, Luční č.50, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, /ĝardenisto/ kun ĉiuj landoj pri pacmovado, interŝ.il.p.k., certe respondas.

K-do.Kiril Viĉev KOLEV/21 jara/ Pod.45280, STANKE DIMITROV, Bulgario, pri ĉiuj temoj, interŝanĝ. il.p.k.Respondas certe.

I.letervespero de Esp-Junularo en Olomouc okazas la 31. de aŭg. Salutkartojn kaj leterojn sendu al k-do Miloš RUDOLF, Wanklova č.14 , OLOMOUC, Ĉeĥoslovakio. Ĉiu ricevos respondon kaj kor-anton.

K-do Jan PFEFFER, Třída „kpt . Jaroše č.25/III, KLATOVY, Ĉeĥoslovakio, II.p.k., gaz.kt, kun ĉiuj landoj.

K-do.Josef KAMENÍK, Komenského č. 852 , HULÍN, Morava, Ĉeĥoslovakio, per il.p.k., let., interŝ. p.m. kun ĉiuj landoj kaj sportgazetojn.

La k-do pomesas nepre respondi.

K-dino.Boena KAMENÍKOVÁ, Komenského 852, HULÍN, Morava, Ĉeĥoslovakio, koresp. kaj interŝ.il.p.k. modajn gazetojn kun ĉiuj landoj.

K-do A.Strobl, Sladkovského č.67, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, nur p.m.novaĵojn kun Aŭstrio. Korespondas germane kaj esperante.

K-do.Ivan KOLEV, Str.Dinju Nojkov Nc, .11, NOVA ZAGORA, Bulgario, 22jara ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Certe respondas.

K-dino., ENEKER, Kerstrujej 62, KOPENHAGO-VALBY, Danmarkio, pri ĉiuj temoj kun popoldem. landoj. Ŝia 11 jara filino korespondas kun infanoj por il.p.k.

K-do.Jean DALET, 79 bis, rue de Chateau, ASNIEREŝ, /Seine/Francio interpretas ŝanĝon de poŝtmarkoj ĉefe kun popoldem.landoj.Afranku filateliste!

K-do. Petro BORISOV, ALEKSANDROVO, Sviŝtorsko, Bulario, kun ĉ.land.

K-do.Jasques LONRD, 5 rue de la Preva, lance, Villeurbanne, /Rhone/ Francio, petas por ekspozicio aranĝota en decembro: let., p.k., fotojn, afiŝojn, librojn ktp. Mi deziras ankaŭ ricevi raportojn pri laborista vivo, vivkostoj, bataloj ktp.por represi en francaj ĵurnaloj.Laŭ ebleco ni rekompencos per franca materialo.

K-do.V.KOLÁČEK, vedoucí, Dům Osvěty (Dono de kulturo) BILINA, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj pri pacmovado kaj kulturo, interŝanĝ. il.p.k, afiŝojn, gvidlibrojn.

K-do.Borislav Anglev VELEV, "Stalin"5, GOCE DELČEV, Bulgario, petas por ekspozicio, komunistan kaj porpacan materialon:gazetojn, afiŝojn, portretojn de partigvidantoj, fotojn kun esp.klarigoj.

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO, TATRA, n.p.KOPŘINICE.

Redaktis: K-do.Rudolf BURDA, Palackého náměstí č. 6, PLZEŇ,

Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O
